



L'ALVOKO

OFICIALA ORGANO
DE LA KEBEKA ESPERANTO KLUBO

No. 13


19an de Majo 1964

Tiu eldonaĵo estas la lasta de la estanta jaro,
kaj okaze de tio, ni volas esprimi niajn plej bonajn
dezirojn por tre agrablaj someraj ferioj.

Ni volas danki niajn sindonemajn profeserojn, kaj
ciuajn gelernantojn, kiuj tre asidue sekvis la esperan-
tistajn kursejn kaj tiel respondis al "L'ALVOKO".

Gis la aŭtuno....

LA ESTRARO.



FORVENDI LA VAROJN

Dume la garaĝistoj de la vojflanka servejo tute dispecigis mian karburilmontaĵon penante trovi la ĝenaĵon kiu kauzis ĝiajn frenezajn ekskuojn, mi iris eksteren, konversi kun la lokuloj. Rigardi mekanistojn dispartigi motoron nervozigas min.

Estis du viroj sidantaj sur la malalta rando de la garaĝfenestro. Unu estis juna viro, kiu vartis ŝmurligitan kartonaĵon. La alia estis maljuneta kun kaduka valizo apud siaj piedoj.

Plej parte la trafiko iris supren. Sed kiam ajn iu malsupreniranto turniĝis al la benzinpumpilo, ambaŭ viroj stariĝis kaj eldemandis pri veturo. Ili estis irontaj suden.

"Se vi estas senrimedaj ĉi tie," mi diris, kiam ili residis post la tria aŭ la kvara maltrafo, "vi povos rajdi kun mi, kiam mia auto estos preta."

Ili varme dankis min, kaj mi sidis kun ili sur la fenestrobreto.

"Kiom da distanco vi estas ironto? mi demandis.

"Nu, mi ĵus iros tri mejlojn," diris la junulo kun la kartonaĵo. "Mi havas farmbienon tie. Mia ĉaro estas enremisigita."

"Kaj vi?" mi demandis la mezaĝulon.

"Nu, ne precizan distancon," li diris. "Mi serĉas kian ajn laboron. Do, mi haltiĝos ĉe unu el la urboj apud la vojo kaj esploros."

La junulo ridis.

"Vi havas ankaŭ serĉas laboron?" mi demandis.

"Ne," li diris. "Sed vidu tiun kartonaĵon! Ĝi estas plena da ovoĵ. Vi ne bezonas freŝajn ovoĵn, ĉu?"

"Jes ja, mi povus aĉeti du aŭ tri dekduojn," mi diris. "Kio estas la problemo?"

"Mi iris tra tri nordaj urboj ĉi tiun matenon," diris la junulo, "provante vendi tiujn ovoĵn. Sed ĉiu sufiĉajn havis, aŭ ilia vendisto provizas ilin. Mi ne forvendis eĉ unu dekduon hodiaŭ."

Kaj li iomete piedfrapis la kartonaĵon.

"Ĉu via farmbieno estas ĉe tiu ĉi vojo?" mi pridemandis.

Ĉar vere, la trafiko estis tute viveca, kvankam tio ĉi estis dua vojo. "Jes, tamen....."

"Ĉu vi elmetis afiŝon "freŝaj ovoĵ"? mi informiĝis. "Intersemajne vi devus fari....."

"Mi havas pli bone ol afiŝon elmetitan," diris la junulo. "Mi havas belan gruzan enirejon kaj budeton. Tie mia fratino staras por servi la publikon. Sed vi vidos mian problemon, kiam vi kunprenos min."

Ni ambaŭ, la mezaĝulo kaj mi scivole rigardis lin.

"Mia domo," li diris, "staras ĉe la montetpiedo apud S kurbo. Mi loĝas dekstraflanke. La trafiko venante malsupren ne vidas mian budon antaŭ ol preskau preterpasas. Kaj suprenirantuloj ne volas malakceli kaj transiri la vojon pro tiu farenda suprenkrubo antaŭe."

"Ĉu vi povas movigi la budon for de la montetpiedo?" mi kontrolis.

"Ne, tie estas kruta rando," diris la junulo.

La mezaĝulo levis sian manon.

"Ŝajnas al mi," li diris, "estos laboro por mi."

Li siavice estis rigardata.

"Atendu, mi vidu la ĉirkaŭaĵon," li ridetis. "Tamen mi estas sufiĉe aĝa nun por devi vivteni min per mia cerbo. Mi supozas, eble mi povos helpi tiun ĉi junulon."

Ni ankoraŭ serĉis kion li cerbumis, kiam la garaĝuloj sciigis min ke mia auto estis remuntita kaj preta.

Mi enmetis miajn novajn amikojn kun iliaj pakaĵoj.

Tri mejlojn antaŭen laŭ la vojo ni alvenis al la S turno kaj la monteto.

"Malrapide" vokis la pli aĝa viro de la malantaŭa seĝo.

Malrapide mi alproksimiĝis al la montetrando. Dekstraflanke kampo finiĝis en arbustaro kun arbetoj ĉe la barilangulo.

"Bonege!" ekkriis la mazaĝa viro.

Malrapide mi glitumis la S turnon. Kiam ni turnis laŭ la fundoturno, ekaperis dekstre neta gruzeniro, tiel larĝa kiel oni vidas da ili ĉe la ordinaraj garaĝoj, kaj ĉe la fino, eta budo kun vendotablo, kie knabino prezidis.

Elstare sur la budo, kaj same sur alia blanka afiŝo ĉe la plej malproksima fino, vidiĝis la vortoj: "Freŝaj Ovoj."

Ĉus kiam mi turnis al la gruzo, aŭto bolidante malsupren de malantaŭ avertis min per ekblovego de sia korno.

"Vi vidas?" diris la junulo. "Tiel ili preterpasas."

La alia viro elveturiĝis, valizo kaj ĉio.

"Jen", li diris, "pruntu al mi vian kaskedon."

La junulo portis durpintan kaskedon de neklarifikebla koloro.

"Vi atendu tie ĉi, "diris la mezaĝulo, "kaj vidu tion, kio okazos."

Li metis sian valizon en la budon, kaj tiam rapide remarŝis supren sur la monteton, kaj malaperis je la S Turno.

"Nu!" diris mi.

Mi parkis mian aŭton malantaŭ la budo, kaj la junulo donis la pakajon trans la vendotablon al la knabino.

Kvar au kvin aŭtoj kaj unu aŭ du ŝarĝaŭtaoj rapidis malsupren kaj preterpasis urĝe.

Tiam auto venis malrapide kaj ne urĝe.

Ĝi bremsis vidante nin, kaj turnis sur la gruzon.

"Bonan tagon!" diris la juna farmisto alirante.

"Hm," aŭdigis la motoristo, "Ĉu vi povas diri se estas rapideckaptilo tie sur la monteto?"

"Rapiddeckaptilo?" demandis la junulo.

"Nu, mi ĵus alvenis la monteton," diris la aŭtisto, "kiam mi vidis viron starante en arbeto, tie, kun halthorloĝo en la mano."

Alia automobilo alvenis, iom malrapide, malsupren. Ĝi preteriris.

Sed la sekvanta aŭto parkis malantaŭ la unua.

"Ne, mi ne scias pritio," diris la juna farmisto.

"Mi ĵus kaptis lin okulangle," diris la unua motoristo. "Li havis poŝhorloĝon enmane kaj notlibreton, mi opinias."

La novveninto elveturiĝis, kaj venis al ni.

"Ĉu vi povas dire al mi," li demandis, "se estas policano ĉe la fino de la monteto, tie transe?"

Ni vendis ses dekduojn al la unua kaj kvar al la dua.

Ili ja haltis tie ĉi, do ili profitu la okazon por aĉeti iom.

Precipe kiam estis inoj. Ĉi tiuj kutime elveturiĝis por ĝui la elmontron de ovoj, boteloj, hejmfarita acersukero, kaj ladskatoloj plenaj da mielo, super kiuj la timema knabino prezidis malantaŭ la vendotablo.

Mi restis unu horon kaj duonon, ĝis al alveno de la pli aĝa viro por lunci.

Ili vendis dudek dekduojn da ovojn, ses potojn da siropo kaj kvar dufunskatolojn da mielo (lastjara).

"Ni havas neokupatan ĉambro", diris la junulo al la mesaĝa viro.

"Tio estas tute laŭ mia gusto," diris la mezaĝulo. "Mi sidas sur ŝtonego tie en la arbeto. Kaj ĉio, kion mi faras, estas starigi kiam aŭto alvenas, kaj rigardi mian manon, kvazaŭ mi havus horloĝon en ĝi."

La trafiko ree senatente preterflugis.

Ili venigis min laŭ la vojeto al la farmdomo por lunci.

"Efektive," mi diris, "tio estas kvazaŭ trompo, ĉu ne?"

"Mi opinias, ke tio nomiĝas, laŭ la nuntempo diro: "Forvendi la varojn," diris la mezaĝulo, manĝante.

Gregory Clark

(El la WEEKEND Magazine Vo. 11 No. 21, 1961)

El la Angla tradukis

F. Paul Durette.

NI PAROLU PRI VETURADO

La junaj fraŭlinoj en Victoria estas klasifikatoj tia maniere: la sociistinoj, la deĵorentigoj, la edzoserĉistinoj, kaj la senripozaj, ambiciaj vojaĝistinoj. Aŭ oni foriras je la aĝo da dudek, aŭ oni ĉiam restadas. Apartenante al tiu kategorio, mi nun estas en Quebec, kaj miriĝas pro la multaj mejloj, kiujn mi kovris dum la pasinta jaro.

Forlasante Victoria je la 30an de Marto 1963, mi elvenas al Quebec, 3200 mejloj pli malproksime. Tio estas nur la komenco de miaj vojaĝoj.

Kvankam loĝante en tia ĉarma urbo, malgraŭ tio, mi estas interesata viziti aliajn urbojn, vilagojn, kaj distriktojn en ĉi-tiu vasta franca provinco. Tion mi faras dum la someraj, kaj aŭtunaj monatoj.

Anticipante tri semajnan libertempon, je Krisnasko, mia frato Paulo, kaj mi, decidas reiri nian hejmon. Do miajn valizon ankoraŭfoje mi pakas, kaj akompaniata de Paulo, petveturas ĝis Montreal, kie ni eksaltas la longan vagonmigredon, kontrectempe, trans la kontinento.

Akirante automobilon, kium mi tuj nomas "Petunia" mastage, mi ekiras Montreal, sabato, la 2lan de decembor. Decidante transiri Kanadon, mi sangas miajn intencojn, en Thousand Islands, kaj eniras Usonon. Mi trapasas Buffalo, N.Y., Cleveland, Ohio, kaj alvenas al Chicago je la 5a a.t.m. Tiutempe, laciĝinte, mi eniras restoracion kun miaj botoj en la malbonaj piedoj! Forlasante Chicago je la 10a a.t.m., kaj estante bonsanculino, mi havas sunbrilan veteron, kiel por la resto de la ekskurso, kaj alvenas al Wisconsin. Ĉi tie, mi ripozas, babilante kun personoj, kiuj estas tre amikaj. Ĉi-tiu, ŝtato estas nominta "Laktolendo de Ameriko", tiel, mi vizitas fromaĝobutikon, kaj aĉetas iom.

Daurigante, mi alvenas al la ĝenetaj urboj, moderna urbo Minneapolis, kaj malmoderna St. Paul's, en Minnesota, kie mi vizitas trinkejon, ornamata de diversaj pafiloj de la malnova okcidento. Ĉi-tie mi tranoktas. Lundo, matene, mi estas vigla je la ektagiĝo, kaj decidas senhaltiĝi ĝis mi atingos mian celon.

Mi matenmanĝas en Aberdeen, South Dakota, loko de novaj kvingenaskitoj. Ĉi-tio estas stepa ŝtato, tute dezerte, kaj malriĉa. Mi tagmanĝas en Montana, ŝtato de malglataj seenaĵoj, salviaj arboj, kaj ruĝo argilo. - tute tipa pajzajo de bovistoj. La loĝantaro estas tiel amika, ĝuante ĝon fideman vivon. Ili donas dolarerojn, kondukas "Cadillacs", manĝas bifstekon ŝuos bovistajn botojn, kaj trenparolas, kion, malgraŭe, mi rapide ekimitas.

Kvankam, dezirante restadi, mi estas maltrankvila trapasi la monteĝojn, Mi alvenas al Helena, la urbo ĉe labezo de la "Rokaj Montegoj" je la 2a a.t.m. Mardo matene. Ĉi-tie mi enneĝigas la veturilon, kaj helpe de la sola, disponeble viro, ebruiilo, ni sukcesas elnoĝigi ĝin, kaj mi foriras sed unu horo malfrue. Mi transveturas Idaho kaj alvenas al Spokane, Washington je la 9a a.t.m. Mi cirkau vizitas la urbon, kaj aliras, anticipante la lastan longan etapon, kiu estos la pli longa.

Mi trapasas "the Grand Coulee" digon, kaj, suprenveturas la "Monteajn - - - "Cascade", tra konstantaj sengardorelaj kurbiĝoj, laŭlonga profundegaĵo 3,000 futojn malalta. Post tiu danĝera kaj streĉa pasado, mi alvenas al la vilaĝo Wenatchee, de tie al Vancouver kie mi veturas sur nova ĉefvojo.

Envenente dudek minutojn tro malfrue por la transundŝipo, mi ĝuas bonan, longan nokton post 40 horo de seninterĉesa veturado. Matene, mi lasas Vancouver, kaj alvenas al l'insulo je la 10a a.t.m. Victoria salutata min de varma veturo kaj armeoj de floraroj en gardenoj.

La sperton mi gagnas, la landon mi vidas, kaj la konatojn mi renovigas, post tri tagoj kaj duono de konstanta penvalora veturado.

Post ses tagoj hejme, mi audias "Petunia" kaj transpasas Kanadon per vagonaro, envenante Quebec precize du semajnoj post mia foriro, kaj veturado de 7,000 mejlojn al mia kredito.

Ni instruas en Quebec ĝis kiam denove mi havas libertempon. En kvin tagoj mi veturas al Prince Edward Island - 1200 mejloj, iren kaj reen. Mi pasas tra

New Brunswick kiu rememorigas min de Washington, kaj Prince-Edward Island estas reale unu bela insulo, simila al Vancouver Island, sed la tero estas tre tre ruĝa. La loĝantaro ankaŭ estas konata kiel tre amika. Mi volus vivi tie.

Kio estas en la estonteco? Mi projektas iri New-York City en Majo, Newfoundland en Junio, kaj Victoria venontan someron. Revenante al Quebec en Septembro laŭ San-Francisco, Los Angeles, Mexico, kaj la mezaj ŝtatoj de la Usono.

Mi pensas ke ĉi tiu vivo estas la plej bona kiam juna kaj senedzo - kaj mia moto estas: Ni vojaĝu!

Rose-Marie Lavertu.

LEGENDA ARTIKOLO PRI ESPERANTO

"MUZIKO DE LA LINGVO"

BULGARIO
Marto 1964.

Muzikisto kaj instrumento

La lingvo, ilo de la menso, estas simila al muzika instrumento. Kaj la persono kiu ĝin uzas (parolas, skribas, verkas en ĝi), similas al ludanto. En la manoj de lerta muzikisto la instrumento sonas mirinde bele, elvokas larmojn en la okuloj de la aŭdantoj. La bona virtuozo kapablas eltiri maksimumon da estetika efeto el instrumento kun minimumo da eblecoj (Paganini ĉarmis la publikon, ludante violonon kun tri ŝiritaj kordoj). Sed la mallerta ludanto nur kompromitas la muzikon, kiun li interpretas. En la manoj de muziklernanto aŭ de komencanta violonisto eĉ la plej perfekta instrumento de Stradivarius produktas nur malglatajn, grincantajn, akre malagrablajn sonojn, kiuj indignigas nervigas kaj fortimigas la aŭdantojn. Aliflanke, la bona ludisto nem agordas sian instrumenton, se ĝi ne kontentigas liajn postulojn.

Same estas kun la lingvoj.

La artistoj (kreantaj subjektoj) - verkistoj, poetoj, oratoroj, eĉ la simplaj parolantoj mem adaptas la lingvon al siaj bezonoj, agordas ĝin al la gamo de siaj pensoj, de siaj estetikaj konceptoj kaj tiamaniere povas eltiri el ĝi ĉiujn efetojn. La uzantoj perfektigas la lingvon. La toskana dialekto estis ankoraŭ tute neperfekta, kiam Dante Alighieri komencis verki en ĝi, kaj liaj samtempuloj konsideris nur la latinan lingvon inda je arta kreado. Tamen per siaj verkoj Dante levis la toskanan dialekton ĝis la rango de la moderna, klasika, perfekta itala lingvo. Male ĉiu persono kiu mallerte uzas iun lingvon, nepre degenerigos "fuŝos" ĝin - eĉ se li parolas la plej perfektan la plej melodian lingvon. Tiam impreson ni havas, kiam ni aŭdas komencantojn (eĉ progresintojn!) el diversaj nacioj balbuti la francan, la anglan, la italan, la germanan aŭ la rusan lingvon. La malperfekteco en tiuj ĉi kazoj ne estas imanenta (denaska) eco de la lingvo mem, sed de la parolantoj, kiuj ĝin uzas.

Tiu ĉi sama principo validas ankaŭ por la lingvo Esperanto.

La helsoneco, la perfektco de Esperanto dependas de ni mem - de ni, esperantistoj. Ni ĉiuj devas havi fortan strebon ne nur al korekta, sed ankaŭ al bela, arta parolado en Esperanto eĉ en la plej ordinara, ĉiutaga uzo de nia lingvo. Tiamaniere, perfektigante en praktikado de tiu ĉi mirinda instrumento kaj ekmajstrante ĝin tiel same, kiel la vera virtuoza majstras sian muzikinstrumenton, ni plaj multe kontribuos al la plibeligo de Esperanto, al la plialtigo de ĝia estetikaj valoro.

FESTO AL SHAWINIGAN

Dum Aprilo, la Kebeka Esperanto-Klubo ricevis amikan inviton de la estraro de Shawinigan. Okaze de tiu festo, ili volis substreki la sindonemon de frato Bertin al la esperanta movado, kiel profesoro de la tieaj studentoj, kaj iniciatinto de tiu grupo.

Kelkaj kebekanoj korige akceptis, kaj partoprenis al tiu amika kunveno. Ni havis plezuron renkontiĝi, kaj amikiĝi kun geesperantistoj el Tri-Riveroj, Montrealo, kaj kompreneble el Shawinigan.

La anoj de Shawinigan estas tre gastamaj speciale ni dankas la prezidanton Paul Villemure, kaj la aliajn gesubestrojn de tiu nova, kaj esperiga grupo.

Post la dancado, ni havis la plezuron aŭskulti Sinjorinon Thérèse Héroux, kiu donis agrablan paroladeton pri sia traŭropa vojaĝo, kiel kutime la ge-estantoj multe interesiĝis.

La vespero finiĝis kun bongustega bufedo, kiu permesis al ni, riveni Kebekon, feliĉaj, kaj dankemaj al la grupo de Shawinigan.

Mi nur bedaŭras ke la kebekanoj ne estis pli multnombraj.

Vincent Beaupré.

E L E K T A D O

NOVA ESTRARO POR LA JARO 1964-65

Je la 29a de Aprilo, la Anoj de la Kebeka-Esperanto-Klubo elektis la jenan estraron:

- S-ro Henri Brunelle, prezidanto,
- S-ino Noel Doré, vic-prezidantino,
- F-ino Marcelle Aubé, Sekretarino-Kaŝistino,
- S-ino Marcel Rondeau, Asistanto Sekretarino-kaŝistino,
- Frato Vianney Bolduc, Publicisto,
- S-ro J.-M. Gingras, Bibliotekisto,
- S-ro Vincent Beaupré, Direktoro,
- S-ro Eugene Melanson, Direktoro.

Por informoj adresu jene: F-ino Marcelle Aubé, Sekretarino,
139 Cremazie Ouest, Québec 6.